

KIA ESTONTO POR UKRAINIO ?

Verkita de *Éric Bernard COFFINET* (ebcoffinet.fr) je la 19 de januaro 2025

Mi provas resumi intervujon de fakulo pri internacia financo, S-ro *Gérald AUTIER* (Ĵeraldo Otje'), pri la estonto de Ukrainio post la fino de la milito en tiu lando inter Usono-NATO kaj Rusio. (en la franca lingvo ĉe https://youtu.be/1D-D4VGbh6k?si=S2CZKk_q-WJz6GIJ)

Tiu fakulo aludas studon de la Internacia Instituto por Paco (*International Peace Institut*) en rilatoj kun UNoj pri 344 perarmilaj konfliktoj okazintaj inter 1945 kaj 1999. Laŭ ĝi la plej granda risko de fremda interveno milita en iu lando estas, ke ĉi-tiu posedas abundan rimedon ne uzatan de ĝi sed tre bezonatan de aliaj... tio estas faktoro multe pli decidiga ol defendo de rajto je libera decidiĝo aŭ de neŝangeblaj landlimoj, ol promocio por demokratio aŭ por la homaj rajtoj !

Ukranio bedaŭrinde troviĝas en tiu situacio, ĉar oni taksas ke en ĝi subtere kuŝas trezoro je 10 000 000 000 000 usonaj dolaroj da valoraj ercoj kiel fero, titano, litio kaj aliaj diversaj kemiaĵoj. Ili estas raraj kaj nepre necesaj por industrioj elektronikaj, aerokosmaj, defendaj kaj novenergiaj, sed produktadon kaj vendadon de ili nun internacie superregas Ĉinio ! Trovi kaj ekspluati novajn minojn de tiuj ercoj por liberiĝi el la minaca hegemonio de Ĉinio estas fundamenta kaŭzo de la ekmilito de Usono kun ĝiaj eŭropaj vasaloj kontraŭ Rusio en Ukrainio.

La societo *BlackRock* kreita en 1988 de la elstara figuro de "*Woke Capitalism*" (Ŭokisma Kapitalismo) *Larry FINK*, propre posedas "nur" 150 000 000 000 usonajn dolarojn sed administras 10 000 000 000 000 usonajn dolarojn da aktivoj. Ĝi subskribis en 2022 kun Volodimiro Zelenskijo kontrakton por la rekonstruado de Ukrainio post la fino de la milito, kiu kostos almenaŭ 500 000 000 000 usonajn dolarojn. *BlackRock* proponis siajn "senpagajn" (!) konsilojn al la ukraina registaro cele al elekto de la plej taŭgaj posedaĵoj uzotaj kiel vendaĵoj aŭ garantiaĵoj por financi tiun rekonstruadon. Konsiderante la "astronomie" altan nivelon de siaj monŝuldoj kaj de sia korupteco, ukraina registaro tre malfacile povos rifuzi "proponojn" de *BlackRock* kaj de internaciaj investontoj, por kiuj Zelenskijo jam dekretis novajn leĝojn favore al ilia ekposedo de bienoj fekundaj, de minoj riĉaj, de firmaoj produktivaj aŭ de porspekulaciaj konstruaĵoj.

Disdivido de strategiaj aktivaĵoj ukrainaj inter Usono kaj Rusio estas la kerno de la baldaŭa intertraktado porpaca... Sed alia danĝero minacas Ukrainon : malkresko de ĝia loĝantaro ! Ĝin oni nombris je 50 000 000 en la jardeko 1990, je 45 000 000 en la jardeko 2000, je 40 000 000 en la jardeko 2010, nun je 28 000 000 kaj estonte nur inter 10 kaj 15 milionoj en 2100 laŭ UNoj... Tion kaŭzas malforta naskokvanto (averaĝe nur 1,4 infano po virino dum necesas 2,1 por ke la loĝantaro ne malkresku), ekonomiaj malfacilaĵoj kun grava kaj vasta korupto, nuna milito kun multegaj junaj mortintoj, kripligitoj kaj elmigrintoj, kiuj ne plu laboros nek naskos gefilojn en Ukrainio, ankaŭ estonta disdivido de la lando inter Rusio, Pollando, Hungario kaj Rumanio.

Por ekspluati farmobienojn kaj minejojn, funkciigi uzinojn kaj rekontrui Ukrainon, necesos amasa enmigrado konsistanta el junaj ekstereŭropanoj malriĉaj kaj pretaj al ĉio por espero de pli bona vivo. Estos laboristaro multnombra, nefaka, obeema, akceptanta malaltajn salajrojn kaj malbonajn laborkondiĉojn, tute ne zorganta pri la malapero de la ukraina kulturo kaj pri la detrua ekspluatigo de tiu lando por la plej granda profito de la brit-usona financaro internacia.

Kiel diris *Henry KISSINGER* : "malamiki kun Usono povas esti danĝere, sed amiki kun ĝi estas pereige".